

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (874) • 2009 •



Frostitaj fruktoj. Fotis RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021;
✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel Polnický;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
☎ +420 325 615 651;
✉ Cea.polnicky@quick.cz

Kasisto: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
☎ +49 7131 162688;
✉ siegfriedkrueger@arcor.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelp-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
☎ +46 (70) 2004574;
✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

ENHAVO

Virinoj ĉirkaŭ Paŭlo	3
Ili estas gravaj, sed ...	7
Seminario en Zöblitz	8
Prediko en Pribylina	9
Teruraĵoj okazas en centra Afriko	11
Sesdek jaroj da Universalaj rajtoj	12
Ŝlosilo por sukceso aŭ “celu unue Lian Regnon”	13
Laborplano de KELI (III)	14
Rekte, kuraĝe, elegante!	16
Kelklinie pri la tranokto dum EEK	19
Daŭrigo de partoprenlisto de EEK	20
Granda perdo en la Rus-ortodoksa eklezio	21
Informetoj	22
Salutoj el Ĉinio	23
Sankta Augustino	24

REDAKTORAJ VORTOJ

La lastajn redaktajn aranĝojn de tiu ĉi numero mi faras kaptita en Svedio pro malbona vetero. Tio samtempe donis al mi la eblecon viziti mian patrinon. En ĉiu malbono estas iom da bono. La enhavo estas kiel kutime, tre varia pro la diverseco de la kontribuoj. Tamen mi volas akcenti la unuajn artikolojn, kiuj pritraktas la opiniojn de la virinoj en la Biblio kaj la instruo de Paŭlo. Mem, kiel membro de sav-armea familio, mi frue alkutimiĝis al virinaj pastoroj kaj predikantoj. Se vi ŝatus komenti kaj aldoni al la temo, mi multe ĝojus. Aŭ tio estas temo nur por teologoj? Mi ankaŭ ŝatus ke vi pripensu la laborplanon sur paĝo 14. Kion ni povas fari hodiaŭ? Certe ni ne estas pretaj en tiu kampo kaj certe nia persona lingva scio povus perfektigi. Do, iel ni agu!

Virinoj ĉirkaŭ Paŭlo

Éva FARKAS-TATÁR, HU

La jena artikolo jam aperis iom mallongigita en la esperanta gazeto *Femina*. Ni havas la favoron publikigi ĝin komplete. Ĝin sekvas ret-letera interŝanĝo de opinioj inter Bayo AFOLARANMI kaj Armando ZECCHIN.

En kelkaj kristanaj rondoj nuntempaj oni povas distingi du tute malsamajn tendencojn. Ambaŭ proksimiĝas al ekstremismoj.

En unu oni provas “korekti” la Bibliion, kies skribmaniero respegulas la patriarkecan vivkoncepton de la epokoj, en kiuj oni notis la tekstojn. Tion oni nomas feminisma teologio.

La alian ekstreman pensmanieron reprezentas speciale diversaj fundamentalismaj komunumoj. Ili apelacias ĝenerale pri kelkaj frazoj de apostolo Paŭlo, kiujn ili citas kun tiel serioza konvinko, kvazaŭ ili estus partoj de la Dekalogo.

Iom pri la novtestamentaj datoj: ĉar eĉ la dato de la Naskiĝo estas iom ŝanĝita laŭ pli precizaj kalkuloj, kompreneble ankaŭ la aliaj ciferoj estas relativaj. Dum longaj jardekoj la historietoj, paroloj de kaj pri Jesuo estis nur buŝe disvastigataj. Laŭ la ĝisnunaj esploroj plej frua oni asertas la evangelion sub la nomo de Marko ĉirkaŭ la jaro 70, poste aperis la kolektaĵo sub la nomo de Mateo ĉirkaŭ 80, post tio aperis la evangelio laŭ Luko, en 90, kaj plej malfrue aperis la evangelio laŭ Johano ĉirkaŭ la jaro 100.

Saŭlo, – kiu travivis la mirindan renkontiĝon kun Jesuo Kristo survoje al Damasko ĉirkaŭ 35-40 (la Agoj 9:1-22), poste pasigis iom da tempo en Jerusalemo – poste retiriĝis en la “dezerton” (Gal 1:17,18) antaŭ ol komenci sian misian laboron kiel “kometo” – certe ne povis legi eĉ unu el la evangelioj.

Kion la Biblio eternigis por ni pri liaj renkontiĝoj kun la malnovaj apostoloj tio mencias iom da malkonkordo inter ili. Paŭlo tre konscie deklaris, ke la novuloj, “la nacioj”, la ne-judoj, kiuj rekonas kaj akceptas Jesuon Kriston kiel Savanton ne estu sub la leĝoj de la juda religio. Nek la cirkumcido estu deviga por ili – nek multnombraj leĝoj, ordonoj, reguloj, kiuj tiutempe katenis la religulojn. Nome la jerusalemaj “judkristanoj” plue observis la antaŭajn judajn religiajn leĝojn. Vidinte kaj rekonante la misiajn rezultojn de Paŭlo – la jerusalemaj apostoloj kaj estroj konsentis, ke la konvertintoj al Kristo estu liberaj de tiuj reguloj (la Agoj 15:1-35).

Paŭlo do kun granda entuziasmo predikis pri la Savanto, al kiu la Leĝo, kiel pedagogo kondukas la homojn, sed poste oni ne plu estas sub la pedagogo (Gal 3:24).

En tiu spirito li predikis en la tereno de la nuntempa Sirio kaj Turkio kaj poste en Grekio. En ĉiuj lokoj unue li prezentis sin en la sinagogoj de la tieaj judoj. Kelkloke oni akceptis lian direndon pri la delonge atendita Mesio, kiu alvenis, sinoferis, mortis kaj resurektis. Sed post iom da tempo li devis forlasi la sinagogojn kaj aparte kolektiĝi kun la novaj kredantoj, kiujn tiutempe oni komencis nomi “Kristanoj”. Li kuraĝe parolis pri la libereco de la leĝoj, de la antaŭjuĝoj. Senekzempla estas lia entuziasma deklaro: “Kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston. Ne estas ja judo nek greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina, ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo.”(Gal 3:27,28)

Kvankam li unue ekparolis en la sinagogoj, ĉiam pli multaj diversnaciaj “serĉantoj” aliĝis al la novaj kristanaj komunumoj. Kaj ne havante la malnovajn tradiciajn ordonojn en la ĉiutaga



Maria Magdalena laŭ Tizian

vivo, jen tie, jen aliloke aperis fenomenoj, kiuj indignigis homojn. Ni ne forgesu, ke Korinto estis trafikplena havenurbo de brua vogleco kun bunta loĝantaro de strangaj kutimoj. Kaj ankaŭ parto de la novaj kristanoj varbiĝis el tiuj societoj. Se ni legas la severajn epistolojn de Paŭlo, tie li aludas pri veraj skandaloj.

Li, kiu tiel forte predikis pri la libereco en Jesuo Kristo, nun mem devas krei normojn por reguligi la vivon en tiuj, kelkfoje senbride entuziasmaj grupoj. Kelkfoje li mem bremsas sin kaj skribas: “tion diras mi, ne la Sinjoro”, sed kelkfoje por plialtigi la reputacion de la ordonoj li skribas: “tion diras la Sinjoro”.

La plej kritikataj ĉapitroj estas ĉe li pri la geedzeco kaj pri la rolo de virinoj en la kristanaj komunumoj.

En la unua epistolo al la Korintanoj la tuta 7-a ĉapitro temas pri la geedzeco en sufiĉe sobra kaj bonvola tono. Ni pli bone povas kompreni kial li preskaŭ okulfrappe rekomendas, ke oni ne klopodu al geedza vivo, se ni konscias, ke en tiu tempo la unuaj kristanoj – ankaŭ Paŭlo mem – atendis la baldaŭan revenon de Jesuo Kristo.

En la Agoj ni trovas tiun ideon tiel, ke multaj forvendis siajn domojn kaj bienojn kaj el la prezo vivis la tuta komunumo, ĉar ili forte esperis ke la fino estas proksime (la Agoj 4:34-37).

Sed en la sama epistolo en la 11-a ĉapitro troviĝas iu vere stranga klarigado pri la kapo kovrita kaj vualita, pri longaj haroj kiel honoro, kiel preĝu viro kaj kiel virino. Mi pensas, ke tiam, tiuj al

kiuj li skribis tion, verŝajne komprenis kion celas ĉi tiu admono, sed certe hodiaŭ el tiuj porokazaj frazoj fari ordonon – milde mi diras – estas miskompreno.

Simile strangaj estas liaj konsiloj al la juna Timoteo, kiun li lasis en Efezo – laŭ la komencaj versikloj de la unua epistolo – por admoni kelkajn homojn. Tiu riĉa, malgrandazia urbo estis mondfama pri la Artemis (Diana) kulto, en kiu elstaran rolon havis virinoj, eĉ prostituiinoj. Kiel tio povis influi pens- kaj vivmanieron de la tieaj virinoj ĝenerale – ni ne scias. La konsiloj, donitaj al la juna (kompatinda) Timoteo aludas pri tio, ke Paŭlo deziras enkonduki severan disciplinon. Por substreki tion li uzas eĉ



Maria Magdalena ĉe la kruco

strangajn asertojn el la prahistorio: “Adam ne trompiĝis, sed la virino trompita falis en pekon” (1.Tim 2:14). (Ĉu ne estas pli hontinde esti trompita fare de virino aŭ de la Satano mem?)

sed certe hodiaŭ el tiuj porokazaj frazoj fari ordonon – milde mi diras – estas miskompreno.

Mi povus ankoraŭ mencii pluajn rigoraĵajn asertojn, malpermesojn kaj ordonojn de apostolo Paŭlo, sed mi povus iom ankaŭ senkulpiĝi lin rememorigante pri la situacio, en kiu li faris sian misian laboron. Mi povus ankaŭ mencii plurajn tiajn okazojn kiam li admonas la virojn kiel sindone kaj ofereme ili amu siajn edzinojn (tiel kiel Jesuo Kristo amas la Eklezion). Li havis la okazon renkontiĝi ankaŭ kun elstaraj virinoj, kies meritojn li rekonis. En la Agoj ni informiĝas pri tio, ke ŝipveturinte en Eŭropon, la unua grupo kiun li renkontis estis preĝantaj virinoj kun Lidia, apud rivero, surkampe ĉe la urbo Filipi. Lia plej amata, oferema eklezia komunumo restis tiu de Filipi al kiu li skribis la faman epistolon plenan de ĝojo kaj danko.

Konsiderante, ke Paŭlo ne pasigis multe da tempo kun la malnovaj apostoloj (Gal 1:15, 2:9), kiu scias, ĉu iam okazis, ke ili eksidis kaj iom rakontis al la nova apostolo pri tiuj aventurplenaj tri jaroj kiam ili vagadis kun la Nazaretano. Eble eĉ li mem ne

interesiĝis pri tiu Jesuo “en karno” (2. Kor 5:16). Ĉu li aŭdis pri tio kiel Jesuo amis la infanojn, kiel serioze interparolis pri gravaj temoj kun virinoj (samarianino ĉe la fonto de Jakob,

Despli granda miraklo estas, ke la Sankta Spirito ne permesis perdiĝi tiujn faktojn kaj ili aperis honeste en ĉiuj kvar evangelioj.

Joh.4:5-42; Maria kaj Marta fratinoj de Lazaro, Joh. 11:21-32) – cetere kiom da virinoj sekvis Lin kaj servis al ili (Luk 8:1-3).

Verŝajne ankaŭ pri tio ne aŭdis Paŭlo ke laŭ la evangelio de Marko (15:47, 16:1-11) la releviĝinta Sinjoro unue aperis al Maria Magdalena. Ŝi eĉ estis komisiita diri la mesaĝon de Jesuo Kristo al la disĉiploj “kaj aŭdinte ke li vivas kaj estas vidita de ŝi, ili ne kredis.”

Tiu frumatena sceno apud la malplena tombo de Jesuo estas priskribita en ĉiuj kvar evangelioj kun du-tri aŭ pluraj virinaj nomoj. Do certe ili estis kiuj unue aŭdis Jesuon mem aŭ la anĝelon kaj kun plena ĝojo kuris sciigi la apostolojn pri la miraklo, sed “tiuj vortoj ŝajnis al ili kiel babilado, kaj ili ne kredis al la virinoj” (Luk 24:11).

Tial okazas, ke Paŭlo rakontante pri sia renkontiĝo kun Jesuo survoje al Damasko tiel skribas: “fine li aperis ankaŭ al mi, kiel al infano ekstertempe naskita”. Tiu frazo tiel komenciĝas, kiel resumo de kredkonfeso jene: “Kristo

mortis pro niaj pekoj laŭ la Skriboj; kaj li estis entombigita; kaj li releviĝis la trian tagon laŭ la Skriboj; kaj li aperis al Kefas (Petro), poste al la dekdu; poste li aperis al pli ol kvincent fratoj samtempe...” Kial Paŭlo ne mencias tion, kio estas klare skribita en ĉiuj kvar evangelioj, ke unue la ĝisfunde tristaj, servopretaj virinoj ekvidis la Releviĝinton kaj komencis disvastigi la Evangelion, ke Kristo vivas!?

Ni scias ja, ke la evangelioj tute ne estis legeblaj tiutempe kaj el la rakontoj la homo tion ekaŭdas, je kio oni estas malfermita. Jes, ja la virina atesto ne estis decidiga en la juda socio.

Despli granda miraklo estas, ke la Sankta Spirito ne permesis perdiĝi tiujn faktojn kaj ili aperis honeste en ĉiuj kvar evangelioj.

Kiu komencas legi la Malnovan Testamenton en la unua ĉapitro trovas iun belan himnon pri la kreado de la mondo. Tiu kreado finiĝas tiel: Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, en formo de viro kaj virino li kreis ilin. Kaj li benis ilin. – Interese en la dua ĉapitro ni legas alian historion. En la 7-a versiklo Dio kreas la homon kaj en la 18-a versiklo li konstata, ke ne estas bone, ke la homo estu sola, elprenas ripon el la vira korpo kaj el tio kreas la virinon. Ambaŭ priskriboj enestas en la Biblio kaj oni povas decidi tra kiuj okulvitroj rigardas la virinojn. Mi pensas, ke Paŭlo estis konvinkita pri la sinsekvo en la dua historio de la kreado, sed Jesuo tiel rigardis la virinon, kiel ŝi aperas en la unua paĝo de la Biblio: homo en virina formo laŭ la bildo de Dio. ☪

Ili estas gravaj, sed...

Diversaj opinioj esprimataj de
Bayo AFOLARANMI kaj Armando ZECCHIN

"Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo" (Galatoj 3:28).

Kiam mi estis kondukita verki la predikon kiun mi dissendis pasintsemajne pri la graveco de la ina infano kaj virino ĝenerale, mi ne unue pensis pri la negativa impliko de la mesaĝo, precipe rilate al la debato pri la roloj de virinoj en la eklezio kaj la nuna movado de liberigo de virinoj. La reagoj de homoj al la mesaĝo igas verki reagon al ĉi tiuj reagoj pri ĉi tiuj aferoj.

Estas mia konsento ke virinoj estas kreitaj je la bildo de Dio kiel help-antinoj similaj al viroj, ke ili havas siajn rolojn por ludi en la mondo kaj por la disvastigo de la evangelio de Jesuo Kristo, ke la virinoj estas egalaj spirite kun viroj, kaj ke ili povas plenumi ian ajn rolon en la eklezio kaj en ia ajn alia loko. Tamen, virinoj devus memori ke ili devus submetiĝi al siaj edzoj, ne gravas la ofico en kiu ili trovas sin.

Mi ne volas aliĝi al la debato pri la roloj de virinoj en la eklezio aŭ en la socio. Se vi opinias ke virinoj devus ne fari aktivan rolon aŭ en la eklezio

aŭ en la socio, bone. Tenu vian opinion. Ne kondamnu homojn kiuj opinias male. Permesu al Dio fari tion. Se vi opinias ke Dio povas uzi virinojn kiel Li uzas virojn en la eklezio kaj en la socio, bone. Tenu vian opinion. Vi ankaŭ ne kondamnu homojn kiuj ne opinias kiel vi. Interpretado de kelkaj partoj de Sankta Biblio ne devus kaŭzi malkonsenton.

Tamen, troa emfazo pri liberigo de virino neas la instruojn de la Sankta Biblio pri la pozicio de virinoj. Virinoj devus esti kontentaj kun la fakto ke je la ordo de Dio, viroj estas la unuaj, poste virinoj. Viroj ankaŭ devas trakti virinojn per honoro kiel kunhered-antinojn de la benoj de Dio por ke ili (la viroj) havu la favoron de Dio (vidu: 1 Petro 3:7).

Je la servo de Dio,
Bayo Afolaranmi (pastoro).

PS. Sendu vian reagon rekte al mi ĉe
<spiritualdigest@yahoo.com>.

Dio benu vin!

Tre estimata Pastoro, viaj komen-
taj vortoj (28 sept) "Tamen,
virinoj devus memori ke ili
devus submetiĝi al siaj edzoj, ne gravas
la ofico en kiu ili trovas sin", kune kun

la aliaj: “Tamen, troa emfazo pri liberigo de virino neas la instruojn de la Sankta Biblio pri la pozicio de virinoj”... Tro kontraŭdiras la akirojn de la moderneco kiu estas ne tute eksterkristana, kaj tro oponas la “Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo” (Galatoj 3:28).

Ni kristanoj ne estas popolo de la libro sed popolo de la Vorto, kaj vorto estas precipe ĉiam en movo: la Spirito per ĝi ĉiam renovigas sian popolon.

La penso de Paŭlo estas certe kaj sendube tiu de la letero al la Galatoj. La aliaj leteroj aŭ ne estas de Paŭlo aŭ ili entenas korektaĵojn aŭ aldonaĵojn

enstelitajn de timigitaj personoj: Tiuj ĉi nome adaptiĝis al la kutimoj hebreaj kaj paganaj kiuj tro protestis kontraŭ kristanoj pro tiu egaleco de virinoj kun viroj.

Estas do evidente ke la Sankta Skribo ne estas io absoluta, sed io influita de samtempa kulturo. Estas nia tasko kompreni ke iuj eroj Skribaj ne estas definitive normaj sed okazaj normoj. Kristano devas adori Jesuon Kriston, ne la Skribon: Kristo estas la absoluto, la Skribo nur vojo legenda laŭ la sento de la komunumo vivanta en la dia Spirito.

Kion vi opinias?
Armando Zecchin.

Seminario en Zöblitz

Invitas Wolfram ROHLOFF, DE

Jam en la numero 5/2008 Wolfram Rohloff, la prezidanto de la germana sekcio de KELI, invitis al la seminario en Zöblitz. Ĝi okazos la 26an – 28 an de junio 2009. Sabate la 27an okazos la jarkunveno de la germana sekcio. Apude vi trovas kelkajn bildojn de tiu bela loko.

Pli da informo en numero 5/2008 kaj ĉe Wolfram Rohloff,
Markt 82, DE-09517 Zöblitz, Germanio,
+49/ 37363/ 4423; fakso: 4404,
rete: keli.prezidanto@web.de



Prediko en Prybilina, 3an aŭgusto 2008

Mateo 28 : 18-20

Philippe COUSSON, FR

Karaj gefratoj,

Fine de tiu kongreso, mi devas lasi al vi mesaĝon de foriro, alvokon por nova jaro, novaj semajnoj. Sed ne tio efektive estis la kaŭzo de la elekto de tiu ĉi teksto.

Fakte, dum kunsido de la konsilantaro de mia eklezia komunumo, la pastoro elektis ĝuste tiun tekston, kaj vekis mian intereson rilate kelkajn vortojn. Mi do studis ĝin, kaj volas dividi kun vi tion, kion mi trovis. Kaj tio taŭgas al la nuna momento.

Tiu ĉi teksto situas en la lasta ĉapitro de la Evangelio laŭ Mateo. Jesuo mortis sur la kruco, estis entombigita, kaj jen, li ne plu estas en la tombo, eĉ li aperis al siaj disĉiploj. Kaj tiam, li sendis ilin. Multaj kristanoj nomas tiun perikopon la granda komisiono. Por ili, tio estas LA tasko de la Eklezio. El ĝi fontas la du grandaj misiaj epokoj de la Eklezia historio, tiu en la komencaj jarcentoj, kaj tiu en niaj jarcentoj.

En la centro de tiuj tri versikloj troviĝas la kerno de tiu komisiono, sed ĝi aspektas ne tiel kutime, kiel oni pensas. Simple pensu en viaj kutimaj tradukoj, kaj denove aŭskultu la esperantan version, sufiĉe proksima al la originala greka: “Disĉipligu ĉiujn naciojn”.

Tio ne estas: “el la homoj el ĉiuj nacioj, trovu kelkajn kaj faru el ili disĉiplojn”, tio estas: “ĉiujn naciojn vi disĉipligu, vi

faru ilin disĉiplojn”. Mi estis tiel alĉutimiĝinta al la tradicia traduko, ke mi ne bone komprenas, kion povas signifi tiuj vortoj “disĉipligu ĉiujn naciojn”. Mi do restas kun demando-signo.

Ni iru do al aliaj elementoj en la teksto. Unue en la konstruado. Oni trovas kvar prezencajn participojn, ne ĉiujn tiel tradukitajn, kaj eĉ kvin se oni aldonas la antaŭan versiklon.

v. 17: vidante lin

v. 18: alproksimiĝante

v. 19: irante kaj baptante

v. 20: instruante.

Ili estas etap-ŝtonoj en la teksto. La disĉiploj vidas Jesuon, kaj ili ador-kliniĝas kaj/aŭ dubas. Jesuo alproksimiĝas, por paroli al ili. Kaj jen, la komisiono en tri etapoj:

irante

baptante

instruante.

Stranga ordo de evangelizo:

unue; iri. tio estas komprenebla.

Neniu ebla kontakto sen aliro al la alia.

due: bapti. Tiel? Dekomence? Sen preparo?

trie: instrui. Poste? Instrui post bapto, kaj ne antaŭ? Kaj kio pri katekizo?

Kio pri preparo por bapto? Aŭ eble, tio ne estas tempa ordo?

Vi nun povas kompreni, ke tiu teksto vekas multajn demandojn. Kaj tio ne estas la fino.


Venas nun la tradicia liturgia formulo de bapto: “en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito”. Vi tamen tuj notu etan diferencon kun nia teksto, kie ankaŭ la esperanta traduko estas bona: “en la nomoN de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito”. Oni do NE ricevas la komision bapti anstataŭ la Patro kaj la Filo kaj la Sankta Spirito, aŭ nome de ili, sed bapti en iliajn nomojn. La nomoj de la Triunuo estas do kiel bapta akvo.

Kelkaj komentistoj diris, ke tio certe estas liturgia formulo posta al la unua redaktado de la teksto, kaj ne apartenas al ĝi, sed ĝi ne mankas en la plej bonaj manuskriptoj, kiel ofte okazas por similaj aldonoj de partetoj. Ŝajne do, ĝi efektive apartenas al la teksto, kvazaŭ dekomence.

Malpli da demandoj vekas la posta rimarko: la vorto “ĉiu” estas uzata kvarfoje en tiuj kelkaj versikloj:

ĉia aŭ ĉiu aŭtoritato aŭ potenco
 ĉiuj etnoj, ĉiuj nacioj
 ĉio kion mi ordonis
 ĉiuj tagoj.

La Evangelio ne estas parta, ĝi estas kompleta. Ĝi ne koncernas parton, ĝi koncernas la tuton. Kaj la komisio lasita



de Jesuo ne estas parta, ĝi rilatas al ĉio.

Pli, kiam oni rigardas la rolon, prenititan de Jesuo en tiu teksto, en la komenco kaj en la fino oni vidas ke Jesuo regas kaj akompanas en ĉiuj lokoj kaj en ĉiuj tempo: en la ĉielo kaj sur la tero, ĉiujn tagojn ĝis la kompletigo de la tempo, ĉie kaj ĉiam. La Evangelio estas ĉio, ĉie kaj ĉiam, por ĉiuj.

Bone, interesaj rimarkoj, instigaj demandoj, kaj nun? Kaj ni? Kiel ĉi tiu teksto povas aplikigi al ni hodiaŭ, kiam ni estas baldaŭ ironitaj al niaj hejmlukoj, al niaj hejmaj eklezioj?

La Sinjoro estas ĉi tie, kaj diras al ni: Disĉipligu vian nacion, vian etnon. Kia tasko! Tro granda! Sed ĉu ne Jesuo ricevis ĉiun potencon, ĉian aŭtoritaton? Tion li klarigis al ni.

Irante: ni baldaŭ vojaĝos, ni baldaŭ alvenos, ni baldaŭ ĉeestos niajn vivkomunumojn. Sed, kiam ni estos alvenintaj, ĉu ni restos hejme, endome, sen iri al aliaj homoj? Se ni ne iras al la pordoj, al la renkontejoj, kiel ni povus obei la lastan komision?

Baptante: se ne ni mem baptas efektive per akvo, ĉu ni vere baptas en la nomon de la triunua Dio? Kiamaniere ni vivas meze de la aliaj portante al ili tiun triunan nomon de nia Dio? Ĉu el nia vivo ŝprucas, fontas la neelĉerpebla fonto de la amo de Dio? Ĉu nia vivo, fido, espero povas iamaniere bapti per radioj de Dia amo? Ĉu tiun ĉi nomon ni parolas, aŭ ĉu ni silentas ĝin? Ni ne havas la imperiestran aŭtoritaton de Karlo la Granda, kiu amase baptis armeon da paganoj, sed ni havas la aŭtoritaton de nia Sinjoro por bapti, akvumi lian nomon, en lian nomon.

Instruante: nur tiu kiu ricevis, nur tiu kiu estis instruita, povas instrui. Kaj instruas nin la Sinjoro, se ni aŭskultas lin, kaj serĉas pri liaj vortoj. Kaj kion instrui? Observi kion li ordonis al ni. Unua afero estas kompreni, serĉi, kion signifas tio, kion li diris al ni, kaj kompreni kiel apliki tion ĉi en nia propra vivo. Nur poste oni povas instrui tion. Tio estas bona logiko. Sed tamen, ne tion li diras. Ĉar fakte, ni ne devas atendi fariĝi perfekta por instrui. La ordono estas instrui, do instrui laŭ nia kompreno, laŭlonge de nia kompreno. Ne nur tiu kiu bone komprenis devas instrui, sed ĉiu disĉiplo, kiu komprenis ke ekzistas

ordonoj por observi, kiu serĉas pri ili, kaj kiu volas vivi ilin.

Poste venas la difino precize de tio, kio estas tiuj ordonoj, sed tio ne estas la temo de ĉi-tiu teksto. Mi simple volas rememorigi vin, ke en tiu evangelio troviĝas la Prediko sur la monto, kiu povas helpi por kompreni, kiuj estas tiuj ordonoj.

Kompreneble, tiu Granda Komisio estas por la tuta eklezio: irante, baptante, instruante disĉipligi la naciojn.

Sed ĝi estas ankaŭ por la unuopa kristano renkonti la alian por, en la potenco kaj protekto de la Sinjoro, dividi la fidon, la amon kaj la esperon en nia Dio.

Amen.

Teruraĵoj okazas en centra Afriko

Honorer SEBUHORO

Korega amiko, vere ĉio spiranta, glori la Eternulon. Dank'al DIO ĉar ni daŭrigas spiri malgraŭ la persekutado kion mi spertis de la 28a de oktobro 2008, ni riskus perdi nian vivon dum tiu katastrofo. Dum tiu granda aflikto en distrikto Rutŝuru kaj Kiwanja estis mortigitaj pli ol 750 personoj, estis danĝere sed dank' al Dio ĉar neniu esperantisto mortis. Dum la milito niaj loĝejoj estis rabitaj de ribelantoj kiuj rabis ĉiujn vestaĵojn, dokumentojn, mian tre ŝatatan porteblan komputilon, 2 okulvitrojn de mia edzino, fine ŝi riskas iĝi blindulino pro manko de ili...

Kia suferado en tiu mistera mondo; preĝu por ni ĉiuj ĉar la malamikoj ne ĉesos mortigi popolon dum nokto, perfortante virinojn, prirabante ĉiu-foje tamen laŭ la sankta Biblio Mateo 24.1-30, Readmon 28.1-48 tio estas la komenco de la suferado por ni ĉiuj. Dio protektu siajn infanojn!

Fine Diobenitan kristnaskon kaj novjaron 2009 mi deziras al vi ĉiuj amikoj.

Kore via amiko. Trasendu al ni la kristanajn revuojn, esperantan modernan kurson, praktikan vortaron, insignojn al miaj lernantoj.

Honorer SEBUHORO; EGLISE CEBCE REMERA/DR CONGO
BP 08 BUNAGANA-KISORO/ UGANDA;

Sesdek Jaroj da Universalaj Rajtoj

Jacques TUINDER, NL

La Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj estas la plej vaste akceptita teksto en la mondo kaj ĝi estas tradukita en almenaŭ 335 lingvojn, nelaste ankaŭ en la lingvon de D-ro Esperanto. Dume, en la konstitucioj de almenaŭ naŭdek landoj oni trovas referencojn al ĝi. Depost 1948 Unuiĝintaj Nacioj akceptis ĉirkaŭ tricent traktatojn kaj deklariojn sur la tereno de homaj rajtoj...

Ĉi tiun jaron [2008] ĝi fariĝos sesdekjarulo, la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Estas kompreneble, ke Amnestio Internacia donos atenton al tiu speciala datreveno jubilea, kaj precipe la 10-an de decembro. Ĝi ja estas la bazo de ĝia gravega laboro humana!

“Kie komenciĝas la universalaj homaj rajtoj? En malgrandaj lokoj. Apud nia hejmo – tiel proksimaj kaj tiel malgrandaj, ke ili troviĝas sur neniuj mapoj. Sed tiuj lokoj estas la mondo de homoj unuopaj: la kvartalo kie ili loĝas; la lernejo kiun ili frekventas; la fabriko, la farmdomo aŭ oficejo kie ili laboras. Se ĉi tie sensignifaj, ĉi tiuj rajtoj ankaŭ aliloke havas malmulte da signifo.”

Jen vortoj de Eleanor Roosevelt en la deka datreveno de la Deklaracio en 1958. La vidvino de la Usona prezidento Franklin D. Roosevelt ludis ŝlosilan rolon en ĝiaj naskiĝotagoj. En ĝi estas

vortigitaj niaj bazaj rajtoj kaj liberecoj, kiel la rajto libere esprimi sian opinion (art.19) kaj la rajto pri honesta proceso (art.10). Nun, post sesdeko da jaroj, la Universala Deklaracio ankoraŭ estas ege aktuala. Ankoraŭ ĉiam oni elhejmiĝas homojn, arestas ilin pro esprimita opinio, malliberigas ilin sen proceso aŭ sen advokata defendo. Ankoraŭ ĉiam oni perfortas, torturas kaj mortigas homojn.

Jam antaŭ la Dua Mondmilito ekzistis planoj por kompili Universalan Deklaracion. Sed nur poste ĝi – sub influo de nepriskribeblaj teruraĵoj kiel la holokaŭsto – realiĝis. La 10-an de decembro 1948 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj ĝin aprobis. 48 landoj donis sian jesan voĉon kaj ok sin detenis, inter kiuj Sovetunio kaj Suda Afriko. Neniu kontraŭis.

Pri preskaŭ ĉiuj tridek artikoloj okazis vastaj debatoj. Eleanor Roosevelt ne preferis ĝisdetalan pritrakton sed kontentis pri paragrafoj malmultvortaj, pri kiuj ĉiuj rapide konsentis. Aborto, mortopuno, rajtoj de minoritatoj... ĉio ĉi malresume eniris la tagordon, sed oni ellasis tiujn aferojn por atingi konsenton. Multaj el ĉi tiuj rajtoj kaj liberecoj eniĝis en postajn paktojn.

Kvankam en si mem ne deviga – ĉar temas ne pri pakto – la Universalan

Deklaracion oni poste uzis kiel bazon por du devigaj UNO-traktatoj pri homaj rajtoj: koncerne civitanajn kaj politikajn rajtojn (1966) kaj koncerne ekonomiajn, socialajn kaj kulturajn rajtojn (1966). Ankaŭ la Eŭropa pakto pri la homaj rajtoj (1950) baziĝas sur ĝi.

Ĉi-jare [2008], la 10-an de decembro, Amnestio Internacia celebras, kiel dirite, la sesdekan naskiĝo-datrevenon de la Deklaracio. Ke la celebros estu mondvasta kaj ĝia efiko grandskala

favore al homoj malliberigitaj aŭ persekutitaj pro konsciencaj kaŭzoj, kiel dekomenca membro de Amnestio, mi ade faris mian eblon disheroldi ĝian mesaĝon en niaj propraj vicoj! Cetere, ĉu esperantistoj ne ĉiam estis la plej fervoraj batalantoj por homaj rajtoj?

[Kvankam la teksto alvenis en bona tempo al la redaktoro, pro diversaj kialoj ĝi nur nun estas publikigita. /Red]

Ŝlosilo por sukceso aŭ "celu unue Lian Regnon"

Larisa KUZMENKO, RU

La rusa prioro Marko Lozinskij iam rakontis en sia prediko la jenon: "Du homoj, kiuj estis najbaroj perlaboris kiel tajloroj. Unu el ili havis multe da infanoj, edzinon, gepatrojn kaj li regule vizitis preĝejon. Li ne havis problemojn en sia vivo kaj dank' al Dio zorgis pri sia granda familio. Lia najbaro profesie estis pli bona, sed vivis sen Dio, preĝejon li ne vizitis. Kaj laboris eĉ dum kristanaj festoj kaj ne povis perlabori sufiĉe da mono eĉ por si mem.

Unufoje pro envio li demandis sian najbaron: "Kial vi tiel rapide riĉiĝas? Mi senĉese laboras, sed ne havas monon". La kristano respondis: "Mi riĉiĝas pro tio ĉar ĉiutage preĝejon iras

kaj sur mia vojo mi trovas oron. Se vi iros kun mi, mi konsentos dividi oron kun vi." La kompatinda najbaro ekkredis kaj komencis viziti la preĝejon. Kio do? Malgraŭ tio, ke li neniam trovis oron baldaŭ li riĉiĝis. Tiam lia najbaro diris al li: "Ĉu vi komprenis, frato, kiom utilas la vizitado de preĝejo por via animo? Sed mi devas agnoski ke mi vizitas preĝejon ne pro oro kiun mi neniam trovis, sed pro tio, ke mi kredas al la vortoj de nia Sinjoro "Celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi" (Mateo 6:33)

Ni, kristanoj, povas aldoni ke ĉion, kio estas necesa por nia savo, donas al ni Dio kaj nia Sankta Eklezio. ✞

DIA REGNO

OFICIALA ORGANO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

Ni daŭrigas nian re-publikigon de la serio de artikoletoj, kiujn verkis la tiama prezidanto Adolf Burkhardt. Kvankam la serio estis verkata en la tiama situacio kaj tempo, multe validas ankoraŭ hodiaŭ. Legu la jenan artikolon kaj trovu la valoraĵojn en ĝi! /red

“Nia laboro ne estas vana en la Sinjoro” Laborplano de KELI (III)

Adolf BURKHARDT, DE

3) Sisteme evoluigi la lingvo-uzon kristanan kaj religian, kaj rilate al la komuna lingvo kaj rilate al la teologia faka terminaro.

a) *Unuecigi ofte uzatajn tekstojn.*

Evidente tiu punkto turnas sin al kelkaj fakuloj, tamen ne tiel ekskluzive kiel unuavide povus ŝajni. En Strandbaden, en 1962, KELI akceptis oficialan tekston de la Patro Nia. La saman tekston oficialigis IKUE. Nur malmulte ĝi devias de la formo trovebla en la Esperanta Biblio. Por praktiki la trovitan unuecon tamen estas necese,

ke ĉiu kompilanto de liturgio k.s. zorge sekvu la oficialan tekston, ne enlasante personajn preferojn. Simile, por citi el la Biblio, oni ne faru mem tradukprovojn el la propra nacia traduko, sed uzu la vortojn de la Esperanta Biblio. Esceptoj estas, se la verkanto volas uzi propran tradukon rekte el la originala teksto kaj povas liveri pli klaran interpreton. Por akiri komunajn parol-

turnojn, estas tre utile kompari ofte uzatajn Bibliajn dir-manierojn el la propra nacia lingvo kun koncernaj lokoj en la Esperanta Biblio. Por la germana lingvo, Erich Quentin kolektis multajn esprimojn kaj publikigis longan liston. Imitinda por aliaj lingvoj, ĉu por publikigo, ĉu por la propra perfektigo en la lingvo.

b) *Kolekti fakajn vortojn por Evangelia Terminaro.*

La fakan lingvon oni evoluigas ĉiufoje kiam oni verkas aŭ tradukas. Terminaro ĉerpu el la lingvo-uzo de ĉi-koncernaj libroj kaj artikoloj. La aperintaj du jarkolektoj de Biblia Revuo liveras abundan materialon por tiu laboro. Due oni povas kontroli la unuopajn sub-fakojn rilate al la disponebla vortprovizo. Se la bezono montriĝas, precize esprimi ideon kiun oni povas sen longa parafrazo esprimi en la ĉefaj lingvoj, oni ne hezitu enkonduki neologismojn se Esperanto ne havas la bezonatan vorton. La aserton ke Esperanto ne bezonas ilin, ordinare faras tiuj, kiuj neniam klopodas uzi Esperanton kiel vere maturan lingvon por ĉiuj celoj kaj sur ĉiuj, ankaŭ altaj, niveloj. Same kiel en la naciaj lingvoj, la fakaj vortoj ne ĝenas la ne-fakulon, kiu neniam tuŝas la koncernan lingvan kampon. – Jam ekzistas Katolika Terminaro. Rezulte de la laborplano, Erich Quentin verkis detalan "Kristana-Evangelia Terminaro" kaj Ingvar Lagerström prilaboris similan verkon laŭ iom aliaj principoj. En Debrecen tri ĉefaj pastoroj akceptis la taskon kunigi

ambaŭ kaj plene esperantigi la difinojn laŭ la modelo de Plena Vortaro.

– kaj ni devus konfesi nian fuŝan konon de tiu sama ilo, kiun ni rekomendas al la mondo.

Denove, tio ne estas nur la laboro de kelkaj vortaristoj. Por profundiĝi en la lingvo ne ekzistas pli taŭga rimedo ol atenta observado kaj registrado de la lingvo-uzo de la praktiko. Ni energie laboru por atingi tian lingvan nivelon, ke ni ne bezonas timi la tagon, kiam oni petos nin grandskale apliki nian lingvon – kaj ni devus konfesi nian fuŝan konon de tiu sama ilo, kiun ni rekomendas al la mondo. Do, punkto 3) koncernas ne nur la specialistojn! Unu sugesto: kritike atentu la lingvo-uzon de DIA REGNO – kaj se vi trovas pli taŭgajn formojn, komuniku ilin al la redaktoro.

☞



Adolf BURKHARDT, 2002

Rekte, kuraĝe, elegante!

Mikaelo BRONŜTEJN, Rusio


Estante ekde jardekoj arda ŝatanto de biografiaj verkoj, mi konvinkiĝis ke, a) ĉiu ajn biografia verko ne povas esti konsumita unuglute, ĉar estas fakte la homa vivo, kiun vi emas enkapigi kaj kompreni; b) ĉiu ajn biografia verko ne estu akceptata kiel veraĵo en la lasta instanco, t.e., se la persono interesas min, mi ne pigru eltrovi almenaŭ unu-du aliajn informfontojn pri la persono.

Do, kiam min atingis freŝeldonita de FEL libro *“Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto”*, tiu libro estis por mi ne la unua fonto de scio pri koncerna persono. Sed, tra leginte la libron kun apliko de mia a-konvinko, t.e. dum kelkaj monatoj, farante paŭzojn inter la ĉapitroj, mi rajtas opinii ĝin esence fundamenta kaj faktoplena verko, utila por la esperantologio. Ankaŭ leginda de ĉiu, kiu ŝatas mergiĝi en la historion ne nur de nia mo-

vado, sed de tiu epoko kruela, mondrenversa, eventoriĉa, kia estis la unua duono de la XX-a jarcento.

La vivo de Lidia Zamenhof, glora kaj kompatinda filino de la Majstro, la vivo, kiu daŭris nur tridek ok jarojn kaj estis feroce rompita kune kun ses milionoj de aliaj judaj vivoj, la vivo brila kaj sindona – sendube meritis detalan intervenon de sperta biografiisto. Estas grava bonŝanco, ke tiun intervenon efektivigis Wendy Heller, profesia lingvisto kaj renoma verkistino. Estas grava bonŝanco, ke la libro estis verkita en la angla kaj eldonita en Oxford.

Ĉar, laŭmerite okupante bretlokon apud gravaj biografiaj esplorverkoj, la libro pri Lidia Zamenhof nepre altigos aŭtoritaton de Esperanto – kaj de la lingvo, kaj de la movado. Estas grava bonŝanco, ke, (ho ve, – nur post pli ol dudek jaroj!) per komuna laboro de la tradukinto Bernhard Westerhoff kaj la aŭtorino mem, la biografio de Lidia, ensorbinta suplementan faktaron, intertempe akiritan, atingis esper-



antlingvan leganton.

De jaro al jaro la vivobildo de Lidia Zamenhof estas fidine disvolvita en 30 ĉapitroj kaj prologo kun epilogo. Tiun bildon abunde ilustras diraĵoj de mem la protagonistino kaj ne malpli abunde – diraĵoj de la ĉirkaŭintaj homoj pri ŝi. Ankaŭ sesdek bonkvalitaj fotoj, karikaturoj kaj dokumentkopioj. Antaŭparoloj – por la anglalingva kaj por la esperanta eldonoj, fontindikoj kaj indekso inde kompletigas la verkon.

La aŭtorino povus komenci la rakonton pri Lidia ekde ŝia naskiĝo, garninte, eble, la komencon per kurta ekskurso en la vivon de la paren caro kaj per referencoj al kelkaj biografiaj verkoj pri la eminenta patro. Sed ŝi ne iris tiun vojon.

“Ĉar ne eblas **kompreni** (MB) Lidian, ne konante Ludovikon, ŝia historio vere komenciĝas per la lia.” – kun tiu opinio Wendy Heller enlibrigas tri unuajn ĉapitrojn sen Lidia, donante per ili bazajn konojn pri la vivo kaj vivkonceptoj de ŝia patro. Sinsekve la tri ĉapitroj havas nomojn: “La doktoro kaj la revo”, “Esperanto” kaj “La Interna Ideo”. Pozitivaj opinioj pri Ludoviko kaj pri Esperanto-movado nepre influas formiĝon de samopinio ĉe leganto ne esperantista. Normale Ludoviko ĉeestas ankaŭ en postaj tri ĉapitroj – jam kun la rolo de patro, edukanto kaj inspiranto. Tiun ĉi lastan rolon vere gravas kompreni por ne miri poste, ke la filino, en infanaĝo indifera por la inventaĵo de sia patro, perdinta lin ĉe sia aĝo nur dekkvarjara, tamen akceptis lian vojon kaj restis fidela al lia ideo dum la tuta vivo.

“Rekte, kuraĝe, elegante!” Jen estis la ĉefa vivslogano de Lidia, iom ŝanĝinta la vortojn de Ludoviko, la slogano por ŝia konscia vivo, por la mondvojaĝo celanta propagandi kaj instrui Esperanton. La libro montras maturiĝon de Lidia, kiel Ĉe-metoda instruistino kaj ŝian triumfan instruadon en eŭropaj landoj. En nia dudek unua jarcento, provizanta abundajn logaĵojn, ni pene povas imagi centpersonajn pagatajn kursojn de Esperanto. Sed Lidia rikoltis tiujn en multaj urboj kaj sukcese gvidis siajn milojn da gelernantoj en Esperantujon. Tiun gloran vivoparton la aŭtorino prezentas kun skrupula detaleco. Ankaŭ la sekvantan usonan periodon, ombrigitan per malsanoj, malestimo kaj eĉ klaĉado de kelkaj esperantlingvanoj – ho, tiutempa ekstera trankvileco de Lidia estas enviinda kaj imitinda!

Jen kaj jen intervenas en la ĉapitroj la bildoj de naskiĝanta kaj evoluanta nazia koŝmaro. Tiun akompanas neho ma malamo al unu gento, al judoj – ne nur en la nazia Germanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉefe en Pollando, la patrujo de Esperanto kaj de Lidia. Wendy Heller donas al la leganto komprenon pri radikoj de tiu malamo: dum magraj vivkondiĉoj de la intermilita tempo la politikistoj devus inventi iun kulpulon por pravigi suferojn de siaj popoloj. Per speciale inventata, konstanta, senhonte kalumnia agitado, ili sukcese enkapigadis al la amasoj, ne ŝatantaj mediti kaj analizi, ke estas la judoj, kiuj kulpas pri ĉio. La situacio pli kaj pli ardiĝas en 1938. Tiam la germana registaro decidis deporti ĉiujn polaj ju-

dojn, loĝintajn dum multaj jaroj en Germanio, reen al Pollando, sed la patrolando ne volas akcepti ilin!

Tamen, mi pensis, kiel tio koncernu Lidia-n? Ja tiutempe ŝi estis en Usono kaj havis plurajn invitojn por gvidi Ĉekursojn. Kiel do okazis, ke tiu plezure akceptata, atendata kaj dezirata instruistino estis devigita reiri al Eŭropo, al Pollando, renkonten al sia morto? La libro detale prezentas evoluon de la eventoj, do mi konkludas, ke parton de la kulpo pri ŝia pereco prenas multaj homoj. La usonaj burokrataj instancoj, postulintaj ŝian foriron – ĉu ili ne estis informitaj pri la situacio en Pollando? Mi dubas. La kanadaj esperantistoj, rifuzintaj la inviton por Lidia – pro antaŭvidataj komplikajoj ĉe preparo de la dokumentoj. La religia gvidanto de Lidia – lin ŝi demandis ĉiam antaŭ fari vican paŝon en la vivo. Jes, li telegrafis, rekomendinte reveni al Pollando, sed, loĝinta en Persujo, eble li ne havis ĝustajn informojn pri la minacoj por la judoj en Eŭropo. Ankaŭ mem Lidia, kies kristala pureco ne permesis mensogi, do ĉe enketo ŝi skribis honeste, ke estis ricevinta monon por sia kursgvidado, sekve malobeis la usonajn leĝojn...

“Se mi forlasis Amerikon, – skribis ŝi al franca korespondanto, – eble estas pro tio, ke Dio preferis, ke mi laboru en alia lando. Kaj en la elekto de Dio la decida konsidero estas ne mia kontenteco, ne mia plezuro, nek eĉ mia sekureco – sed la laboro, kiun mi povas kaj devas fari”.

Ĝis nun mi neniel menciis la konatan fakton, ke Lidia estis adepto de la Bahaa religio. Ankaŭ tiu ŝia vivlinio ĉiupaŝe

ĉeestas en la libro de Wendy Heller. La Gardanto estis Shoghi Efendi, kiun ŝi konsultas konstante. Ŝiaj multnombraj geamikoj-samreligianoj, ame kaj helpeme akceptis ŝin en ĉiuj landoj. Ŝiaj pensoj, venintaj en ŝiajn leterojn – pri Dio, pri la kredo, pri ligo inter la Bahaa religio kaj Esperanto. Al mi, ateisto pro analfabeteco, plaĉas, ke la aŭtorino neniom trudas al la legantoj la religiajn preferojn de Lidia, rakontante pri tiuj egale samkiel pri ĉiuj vivnuancoj, gravaj por la biografio.

La traduko legeblas senpene, ĝinde, sed fojfoje mi stumblis ĉe kelkaj frazoj, nekutime konstruitaj aŭ ĉe vortoj, nePIVe uzitaj. Mi kursivigu kelkajn ekzemplojn: “Multaj venis el eksterlando por viziti d-ron Zamenhof, preskaŭ *kiel pilgrimadon*”. (p.59) “Sur la scenejo staris la eta Lidia, ŝia *aparato, respektive tradukanto* kaj du aliaj esperantistoj. (p.199) “Lidia iris hejmen al Varsovio *dum* kelkaj semajnoj...” (p.232). Sed se mi pritaksu la tuton, certe, laboro de Bernhard Westerhoff meritas sinceran dankon.



Aldone el Vikipedio:

Lidja [Lidia] ZAMENHOF, la plej juna filino de la iniciatinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, naskiĝis je la 29-a de januaro 1904 en Varsovio, estis murdita en la nazia ekstermejo Treblinka iam post somero 1942 /Red

Kelklinie pri la tranoktado en EEK en Vroclavo 2009

Ĉiujn, kiuj iumaniere zorgos pri aliĝoj al EEK, mi devas atentigi (tio ne estis klare substrekitaj en aliĝiloj nur dirita dum IKUE-kongreso en Rimini), ke en la kongresejo estas limigita nombro de ĉambroj - ĉirkaŭ 25 unupersonaj kaj ĉirkaŭ 60 dupersonaj. Tiuj unuaj jam preskaŭ estas okupitaj. Ni dividas ĉambrojn laŭ la vico de aliĝo.

Do, estu preparitaj, ke ni ne garantios menditan ĉambron en kongresejo. Estos ebleco – kompreneble – mendi ĉambron en hotelo. Ni ankaŭ mendis ĉambrojn en studenta hejmo proksime de la kongresejo.

Nun sur la listo estas ĉirkaŭ 95 personoj, el kiuj ĉirkaŭ 10 estas el Vroclavo kaj ili ne bezonas tranoktejon. Do, situacio estas sufiĉe bona, sed Vi rapidu aliĝi

Fratece

Teresa POMORSKA

Listo de novaj partoprenontoj de la EEK

- | | |
|--|--|
| 047 S-ro ŚMIGIELSKI Stanisław Pollando | 069 S-ino ŚUKIENÉ Irena Litovio |
| 048 S-ro ŁĘGOWSKI Leszek Pollando | 070 Sac. ZIELONKA Józef Pollando |
| 049 S-ino ŁOKUCIEWSKA Elwira Pollando | 071 Ju-ino TONTEA Helga Vanessa Rumanio |
| 050 S-ro NOSKE Gottfried Germanio | 072 S-ino LASLO Maria Rumanio |
| 051 S-ro SCHAEFFER Karl Heinz Germanio | 073 S-ro MIHUT Petru Rumanio |
| 052 S-ino SCHAEFFER Hedwig Germanio | 074 S-ro ROMAN Joan Rumanio |
| 053 S-ino WAŃCZYK Roma Pollando | 075 S-ro SCURT Gavril Rumanio |
| 054 Sac. KÓBOR Lajos Hungario | 076 S-ino SCURT Terezia-Ildiko Rumanio |
| 055 S-ro ŁABA Marian Pollando | 077 S-ino LEGAT Doris Austrio |
| 056 S-ro STACHOWICZ Władysław Pollando | 078 S-ino WEESE Anna Pollando |
| 057 S-ino STAMM Sieglinde Aŭstrio | 079 S-ro WEESE Tadeusz Pollando |
| 058 S-ino BELÁŇOVÁ Mária Slovakio | 080 S-ro KIRSCH Janos Hungario |
| 059 S-ino TOMAŠOVIČOVÁ Mária Slovakio | 081 S-ino KIRSCH Agota Hungario |
| 060 S-ino SZUMIGAJ Henryka Pollando | 082 Ju-lino KIRSCH Veronica Agota Hungario |
| 061 S-ino KONCEWICZ Elżbieta Pollando | 083 Ju-lo KIRSCH Marton Aron Hungario |
| 062 S-ro PETRIK Pavol Slovakio | 084 Ju-lo KIRSCH Peter Kristof Hungario |
| 063 S-ino TRZPIL Janina Pollando | 085 Ju-lo KIRSCH Janos Mark Hungario |
| 064 Ju-lo PODBIELSKI Kacper Pollando | 086 Ju-lino KIRSCH Katalin Zsofia Hungario |
| 065 S-ino MOŁDAWA Eleonora Pollando | 087 S-ro GRADEK Antoni Pollando |
| 066 S-ino BARAŃSKA Zofia Pollando | 088 S-ro RATAJCZYK Jeremiasz Pollando |
| 067 S-ro BISSET David Britio | 089 S-ino ŁOWIŃSKA Irena Pollando |
| 068 S-ino BISSET Jean Britio | 090 S-ino CZARNA Jadwiga Pollando |

- 091 S-ino STAWIARSKA Pelagia Pollando
092 Sac. SVALDI Pierluigi Italio
093 S-ino CESCOTTI COVELLI Norma Italio
094 S-ino STRIER Gabriella Rumanio
095 S-ro DUDICH Endre Hungario
096 S-ro KLUMPAR Alois ČeŃio
097 S-ro KEPENCAY Tibor Slovakio
098 S-ino POPOVICIU Eugenia E. Rumanio
099 S-ino OLAH Margareta Judita Rumanio
100 S-ino SZRAIBER Helena Pollando
101 S-ino KOZEK Krystyna Pollando
102 S-ino KOŁPANOWICZ Anna Pollando
103 S-ro DUDA Zbigniew Pollando
104 S-ino SUŁKOWSKA Barbara Pollando
105 S-ino ZDROJEWSKA Renata Pollando
106 S-ino DISCHER Erika Germanio
107 S-ro KALNÝ Jan ČeŃio
108 Mons. VAIČIULIONIS Lionginas Litovio
109 S-ino KERŠYTĖ Emilija Litovio
110 S-ino NOVIKOVA Eugenija Litovio
111 S-ino JALOVECKYT Irena Litovio
112 S-ino NARBUTIENĖ Liudmila Litovio
113 S-ro PUODŽIŪNAS Jonas Litovio
114 S-ino RAILIENĖ Janina Litovio
115 F-lo RAILA Dovydas Litovio
116 S-ino SIČIŪNIENĖ Sigita Litovio
117 F-ino SIČIŪNAITĖ Paulina Litovio
118 S-ino MAZURONYTĖ Gražina Litovio
119 S-ino RUIBIENĖ Zofija Litovio
120 S-ino BIELOVIENĖ Nijolė Litovio
121 S-ino MIELIAUSKAITĖ-GVERGŽDIENĖ
Aldona Litovio
122 S-ino PLERPIENĖ Alina Litovio
123 S-ino LUKOŠEVIČIENĖ Palmira Litovio
124 S-ro NARBUTAS Jurijus Litovio
125 S-ino NARBUTIENĖ Gražina Litovio
126 F-ino NARBUTAITĖ Rūta Litovio
127 S-ro PILIPONIS Algimantas Litovio
128 S-ino GRIKPĖDIENĖ Viktorija Litovio
129 S-ro GRIKPĖDIS Adomas M. Litovio
130 S-ino JACINKEVIČIENĖ Adelė Litovio
131 S-ino KAZĖNIENĖ Vida Litovio
132 S-ro KAZĖNAS Petras Litovio
133 S-ino INDRIŪNAITĖ Genovaitė Marija Litovio
134 S-ro STUDENÝ Jiří ČeŃio
135 S-ino STUDENÁ Pavla ČeŃio
136 Ju-o STUDENÝ Vojtech ČeŃio
137 Ju-ino SUDENÁ Jana ČeŃio
138 F-lo CAMARAS Adrian Rumanio
139 Sac. SZÉP Attila Hungario
140 S-ino SUDÁR Sarolta Hungario
141 S-ino BIKSZÁDI Ilona Hungario
142 S-ro HORRIX Hermann Josef Germanio
143 S-ro MOSER Johannes Germanio
144 S-ro GANSWIJK-VLASBLOM Wil van
Nederlando
145 S-ro LEPPING Stefan Germanio
146 S-ro REITER-KOCHER Heinrich Austrio
147 S-ino REITER-KOCHER - edzino Austrio
148 S-ino WNUK Mirosława Pollando
149 S-ino GAŁAS Genowefa Pollando
150 S-ro KLIM Stanisław Pollando
151 Sac. PŁACHTA Stanisław Pollando
152 S-ino OKRASKO Teresa Pollando
153 S-ino LEDZIŃSKA Waclawa Pollando
154 S-ro MOŻUCH Marian Pollando
155 S-ro AHLRÉN Åke Svedio
156 S-ino MACIŃSKA Krystyna Pollando
157 S-ino GUTKOWSKA Magdalena Pollando
158 S-ro RYBARCZYK Eugeniusz Danio
159 S-ino KUREK Agnieszka Pollando
160 S-ro KUREK Leonard Pollando
161 S-ino PACHURA Elżbieta Pollando
162 S-ino DEMBOWSKA Małgorzata Pollando
163 S-ino POCHANKE Barbara Svislando
164 S-ino HERMAN Krystyna Pollando
165 S-ino PISAREK Gertruda Pollando
166 Sac. PAWLACZEK Stanisław Pollando
167 S-ino SIWOŃ Kazimiera Pollando
168 S-ino MAZZONI Maria Italio
169 S-ino CHISTE Maria Rosaria Italio
170 S-ro NEAU Philippe Francio
171 S-ro DEMBIEC Bogdan Pollando
172 S-ro SALZMANN Karlo Ernesto Germanio
173 S-ino CHEVALIER Marie-Thérèse Francio
174 S-ro CHEVALIER Daniel Francio
175 S-ino SIELICKA Emilia Pollando

Granda perdo en la Rus-ortodoksa eklezio

Informas Larisa KUZMENKO, RU

En interreto funkcias kristana ortodoksa-rondo esperantista. Jen estas la lasta mesaĝo:

La 5-an de decembro forpasis la unua episkopo de la Rusa ortodoksa eklezio – la patriarko Aleksio. Li estis vera paŝtisto, kiu amezorgis sian ŝafaron, kaj ni ĉiuj nun vere malĝojas kaj preĝas pri lia ripozigo en la ĉiela virtulejo. Lia patriarkeco pasis dum la malfacilegaj jaroj de krizo kaj epokŝanĝo. Multon li faris, sed ja multo ankoraŭ farendas. Provizora anstataŭanto de patriarko fariĝis metropoliteno Smolenska kaj Kaliningrada Cirilo. Nova patriarko laŭ la statuto de la Rusa eklezio devas esti elektita de Landa koncilio.

Kore, Elio.

Je la paca forpaso de la Patriarko oni resumas lian agadon, kaj oni refoje povas konstati ke la Rusortodoksa eklezio elektis ĝustan vojon antaŭ dudeko da jaroj. Komparu ĝin kun la industrio, kun la agrikulturo, kun la armeo, kun la kulturo, kun la edukado, kun la scienco... Ĉiuj ruslandaj institucioj diversgrade krizegis kaj regresis, iliaj gvidantoj (feliĉe ne ĉiuj) migris kaj koruptiĝis, la popolaj trezoroj estis privatigataj aŭ vendataj malmultekoste al eksterlando ktp, ktp.



En la tre komplikaj cirkonstancoj la Rusortodoksa eklezio konstante fortikiĝis kaj progresis; malfermiĝis miloj da preĝejoj kaj centoj da monaĥejoj, centmiloj da gejunuloj akceptis la ortodoksismon (certe pli multaj ol aliĝis al iuj partioj), multaj trovis konsolon kiu ne estis trovebla aliloke. Kaj en tio estas granda merito de Aleksio II. Ankaŭ en la reunuiĝo de la enlanda kaj eksterlanda eklezioj en unu Rusortodoksa eklezio, pri kio oni povis paroli kiel pri fantaziaĵo eĉ en la jaroj 1990aj.

Li ripozu en la Ĉiela Regno, kaj ni preĝu por lia animo, kaj la eklezio daŭrigu sian mision en ĉi tiu mondo. Metropolito Kirilo estas tre ŝatata de la ordinaraj kristanoj en la lando, kaj se oni elektos lin, tio havos bonegan efikon al plia prosperado, kvankam oni konscias, ke inter la ekleziestroj li estas malpli populara, ĉar per sia aktivado li neeviteble povis ĝeni la rutinajn pensmanierojn.

Kore, AlKo

Akompan-peto

Mi bezonas nepre akompanon al Vroclavo por la ekumena kongreso en julio de Mannheim respektive Ludwighsafen (Germanio). Mi pagos aŭto- aŭ trajnkostojn. Mi estas handikapita kaj bezonas helpon ĉe la pakaĵo.

Mia nomo estas:

Karlo-Ernesto Salzmann,
Bahnhofstr. 6.

DE- 67059 Ludwigshafen/Rhein;

Telefono: 0621-517404;

Ret-adreso: g.strohmer:p@t-online.de

CENTJARA ESPERANTISTO



Niaj koraj gratuloj iras al Johannes Unico Hommes, kiu la 17-an de novembro festis sian 100-jaran naskiĝtagon. Ankoraŭ nun li amas la lingvon Esperanto, kiu donis al li multan feliĉon en la vivo, per kontaktoj kun la tuta mondo.

Unue li estis instruisto ĉe lernejoj por infanoj kun problemoj, sed poste li instruis fremdajn lingvojn en mezaj lernejoj.

Kiel junulo li lernis la lingvon kun sia patro. Dum multaj jaroj li aktivis en la nederlanda asocio KUNE kaj en la internacia KELI. Por ili li aktivis en “misia fako”. Tiu eldonis bildkartojn kaj broŝurojn kun religiaj temoj. Per ĝi

kristanoj povis ricevi ekzempleron de la Biblio, se tiu ne estis havebla en la propra lando. Oni kelkfoje helpis ankaŭ per medikamentoj. Tio tiutempe certe gravis en la landoj kie la komunismo regis. Similan fakon prizorgis la familio Sandgren en Svedio. Antaŭ ĉirkaŭ 15 jaroj lia edzino mortis kaj nun jam dum ses jaroj s-ro Hommes loĝas en la loĝcentro Sprengerhof en Ugchelen.

Kun afabla permeso de la redaktoro de FEN-X, la membro-organo de Esperanto Nederland.

sendis, Els van Dijk

Salutoj el Ĉinio al la legantoj de Dia Regno

La partoprenantoj en la KELI-kongreso en Pribylina povis legi leteron kaj salutojn de ĉina grupo sub la gvidado de Hsu Chungmu. Nun mi havas la eblecon prezenti tiun grupon ankaŭ al la legantoj de Dia Regno. /Red



Plenan sukceson al KELI Kongreso!
 Multajn salutojn de ĉiuj
 (landanoj) ĉinaj Hsu Chungmu
 Hsu Chungmu kaj partoprenantoj
 (ĉiuj) (parte, tute anst.)

2008.07.07
SUZHOU

Ĝusta KELI sukceso!
 Peki de projekto de invanto Hsu Chungmu.
 Ni komencas kuni ĉiun kaj ĉiun Regnon.
 Ni ekiras la novan mondon — kama
 Duan mondon!
 Ekstaraj Dankoj!!
 Plenan sukceson al KELI kongreso!
 Bilaja sukcesoj en Dia Regno!

Ĉinaj reprezentantoj

La vivas Zhu Ran Lu Lan
 Zhen Jianlin Yang Jiding Xu Xianchun.
 Wang Yun Zhang Diefeng Zhang Shiqin
 He Jianhua

"Ve al tiuj, kiuj silentas pri vi, Dio mia ĉar eĉ la babilemuloj estas mutaj"

Sankta Aŭgustino

Vi estas la plej supera, plej bona,
plej potenca, plej ĉiupova ,
plej kompatema kaj plej justa,
plej sekreta kaj plej ĉeestanta,
plej bela kaj plej forta,
stabila kaj malkomprenebla,
senŝanĝa kaj ĉion ŝanĝanta
neniam nova, neniam malnova, ĉion noviganta,
detruanta la fierulon sen lia scio,
ĉiam aganta ĉiam senmova,
kolektanta kaj senbezona,
portanta, pleniganta kaj protektanta,
kreanta, nutranta kaj finiganta,
serĉanta, kvankam al vi nenio mankas.

Vi amas sen pasio, ĵaluzas sen malcerteco;
hontas sendolore, koleras trankvile;
ŝanĝas viajn agojn senŝanĝi vian decidon;
akceptas la trovatan sen iam perdi ion;
neniam malagas, kaj ĝojas pri la rezulto;
neniam avaras, tamen postulas uzuron;
pagas ŝuldojn sen esti ŝulda,
malŝuldigas nenion perdante.

Tradukis d-ro Endre DUDICH, Budapest